# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 8/1988



*Bonan Kristnaskon kaj prosperan 1989 deziras la estraro de SEF*

# La kongreso 1989

La Esperantoklubo de Norrköping gastigos la venontjaran kongreson de SEF 21-23 aprilo, kaj samtempe la klubo solenos sian 60-jaran jubileon.

Detalajn informojn pri la programo kaj kotizoj vi trovos en la unua numero de La Espero 1989. Jam nun ni povas malkaŝi, ke la kongresejo estos la Popola Domo, kaj ke ni invitis redaktoron Andrzej Pettyn el Pola Radio kiel preleganton. Kvankam ni disponos nur du labortagojn, ni antaŭvidas varian programon. Do bonvenon al vi ĉiuj kune kun ni kongresi kaj soleni nian jubileon en aprilo!

**La Esperantoklubo de Norrköping**

*En Norrköping troviĝas la eble plej granda aro de rokĉiselaĵoj en Svedio. El tiu ĉi riĉa fonto Siw-Britt Söderback ĉerpis inspiron por la emblemo de la kongreso.* )

## DONACOJ

Märtha Andreasson, Hisings Kärra 100:-
(Memore al Sven Alexandersson kaj Ragnar Hjorth)
Anita Lindblom, Kista 50:-
(memore al "Salex")
Motala Esperantoklubb 100:-
Ingrid Ottosson, Stockholm 50:-
(Honore al Lilli Vikström je ŝia 70-jariĝo)
Claes-Göran Ingestedt, Vällingby 100:-
Henry Almar, Trollhättan 100:-

KORAN DANKON!


# *La Espero*

*Organ för Svenska Esperantoförbundet*

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08–11 74 34
**Ansvarig utgivare:** Bertil Åkerberg
**Redaktör:** Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589–155 31
**Sättning:** Per Aarne Fritzon, Lia Eriksson
**Utformning:** Franko Luin
**Tryck:** EsperantoCentro, Stockholm 1988


# *Esperantoförbundet*

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08–11 74 34
**Öppettider:** måndag – fredag kl. 10.00 – 14.00; vintertid måndag – torsdag även 17.30 – 19. Ring före besök!
**Postgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet
**Medlemsavgift 1989:** Direktansluten medlem 125 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem 50 kr.
Enbart prenumeration: 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.
Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

# *SEFs styrelse*

**Ordförande:** Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589–155 31 (La Espero, nordiskt samarbete)
**Vice ordförande:** Märtha Andréasson, Pl. 2265, 425 00 Hisings Kärra, tel. 031–57 11 33 (Årskongresser)
**Sekreterare:** Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08–712 82 91 (kansliet, massmedier)
**Kassör:** Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500–12205 (massmedier)
**Styrelseledamot:** Kerstin Rohdin, Ringvägen 11B, 579 00 Högsby, tel. 0491–20461 (turnéer, bibliotek)
**Styrelseledamot:** Bertil Andreasson, Södra Rörum, 242 00 Hörby, tel. 0415–501 52 (utbildning)
**Styrelseledamot:** Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011–16 26 87 (intern.org.)
**Suppleant:** Ingemar Nordin, Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm, tel. 08 – 41 46 37 (kansliet)
**Suppleant:** Leif Nordenstorm, Studentvägen 36, L:51, 75234 Uppsala tel. 018 – 153362
**Informationskommittén:** Bernt Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589–155 31.

# *Esperantoförlaget*


**Postadress:** Box 7502, 200 42 Malmö
**Besöksadress:** Möllevångsgatan 20B, Malmö
**Telefon:** 040–12 20 29
**Postgiro:** 578–5
**Öppettider:** 1 september – 15 maj: onsdagar 10 – 11, torsdagar 17 – 18.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.
**Expedition:** Wivi Nilsson
**Styrelsens ordförande:** Anita Lindblom.

ISSN 0014-0694
DECEMBRO 1988
76-A JARKOLEKTO
FONDITA EN 1913

La Espero
SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

## Enhavo

82 *La kongreso 1989*
83 *Prezidanto: 1988 same aktiva kiel la jubilea jaro*
84 *Pli bona Esperanto-agado en Svedio*
*Esperantoböcker i bokhandeln*
85 *Gungorna och karusellen*
*Kongresa rezolucio de KELI*
86 *Tri libroj por libroamantoj*
87 *Åttaveckorskurs i esperanto nu också i Nordmöre*
*UEA bonvenigas novan Ĝeneralan Direktoron en Unesko*
88 *4:a internacia kurso esperanta*
89 *TRA LA LANDO:*
*Regionsträff i Hallsberg*
*Årets esperantodag*
90 *Kelkaj ridindaj, kelkaj pripensindaj*
*Prelegvojaĝo de Andrzej Pettyn*



## Prezidanto:



# 1988: Same aktiva kiel la jubilea jaro

Resumante la baldaŭ pasintan jaron, mi konstatis, ke 1988 estis same aktiva ĉe SEF kaj la kluboj kiel la jubilea jaro. La informkunveno por la parlamentanoj okazis la 1-an de februaro, sed bedaŭrinde nur kelkaj parlamentanoj partoprenis. La kialo povas esti, ke samtempe okazis partiaj kunsidoj, aŭ/kaj ke ili ne estis same bone preparitaj en siaj hejmlokoj kiel la antaŭan jaron! Mi volas ripeti, kion mi skribis antaŭe – kaj kio estas konsilo de Ingemund Bengtsson: Kontaktu kaj informu viajn parlamentanojn loke. Invitu ilin al klubkunvenoj. Lasu ilin informi pri sia laboro kaj rakontu pri via! Se vi havas regionajn kunvenojn, invitu ilin al tiuj.

Ingemund Bengtsson emeritiĝis post 37 jaroj en la parlamento, dum la lastaj kiel ĝia prezidanto. Tio signifas, inter alie, ke la Esperantomovado en Svedio perdis sian plej gravan apoganton en la "koridoro de la potenco". Unu konsekvenco estas, ke la informado pri Esperanto al la parlamentanoj preskaŭ ĉesis. Restas tamen kelkaj parlamentanoj, kiuj aŭ mem konas Esperanton, aŭ havas proksiman kontakton kun nia movado. Tiun grupon SEF informas kaj prilaboras regule. Sed la neceso de loka influo je la parlamentanoj kreskos!

Tamen mi volas forte substreki, ke Ingemund Bengtsson ankoraŭ restas grava persono por nia movado en Svedio kaj eksterlande. Li diris kelkfoje, ke kiam li pensiiĝos, li dediĉos pli da tempo al Esperanto. Kaj estu certaj, ke ni memorigos lin pri tio!

Ni havis bonan kontakton kun la sveda UN-asocio. Ĝia prezidanto, Karl-Erik Svartberg, kiu ankaŭ estas parlamentano kaj vizitis nian kongreson en Sundsvall, estas favora al Esperanto. UN apartenas al grava celgrupo, nome internaciaj organizoj. Invitu ilin kaj ili certe siavice invitos nin! En nia plano pri nordia kunlaboro, nun realigata, unu el niaj unuaj taskoj estas informi internaciajn organizojn. Se vi havas ideojn pri tiu kunlaboro, skribu al mi. (Märtha Andreasson kaj mi reprezentas Svedion.) Sed estas ĉiam same – ne nur la "pintaj organizoj" estu informitaj pri Esperanto, ankaŭ la lokaj kaj regionaj devas havi samajn informojn.

Ankaŭ la sindikatoj estas grava celgrupo por ni. Jam hodiaŭ regas sendecido, kiamaniere oni lingve solvos la internaciecon de la entreprenoj. Multaj svedaj entreprenoj

*(daŭrigo sur paĝo 84)*

ja havas internaciajn agadojn. Pro tio la sindikatoj frontas la fakton, ke intertraktadoj kaj interkonsentoj baldaŭ okazos en kelkaj fremdaj lingvoj. Ili bezonos solvon de sia lingva problemo. SEF jam atentigis la unuan vic-prezidanton de LO, Rune Molin, pri Esperanto kaj kompreneble daŭre informos lin. Klubmembroj multe povas helpi en tiu kampo, informante ĉe siaj sindikatoj.

Lastatempe mi ricevis leterojn de membroj pri studorganizoj. Jack Snarberg el Jönköping skribis, ke gravas, ke tiuj organizoj ricevu sciojn pri pozitivaj okazintaĵoj koncerne Esperanto-studojn en eksterlando, por instigi ilin aranĝi kursojn.

Alia letero venis de Curt Boman, Skellefteå, kaj kune venis la gazeto de ABF, kun granda artikolo pri Esperanto. Curt gvidas Esperantokurson ĉe tiu studorganizo, kaj li verkis la artikolon.

Studorganizoj ja estas grupo, kiun ni devas atenti pli – sur ĉiuj niveloj. Sed lige al tio estas problemo, kiun ni devas solvi unue, aŭ almenaŭ samtempe – nome, eduki Esperanto-instruistojn.

Ni devas atenti ankaŭ la kursojn de Karlskoga Popolaltlernejo. Ni ĉiuj povas kontribui al la daŭrigo de tiu agado, informante pri ĝi.

Do, granda, ampleksa laboro estos antaŭ ni ankaŭ la venontan jaron. Sed baldaŭ ni festos la kristnaskajn tagojn kaj momente flankenpuŝos la Esperanto-laboron kaj ĝuos la liberajn tagojn.

Bonan kristnaskon kaj feliĉan novan jaron!

deziras

*Karin Lindquist*

> *La redakcio de La Espero dankas ĉiujn kunhelpantojn kaj kontribuantojn kaj deziras*
>
> **Bonan Kristnaskon kaj Aktivan Jaron 1989!**

*Propono*

# Pli bona Esperanto-agado en Svedio

- Plibonigata ekonomio
- Informoj pri kursoj en bibliotekoj
- Nova tipo de lernado
- Vojaĝaranĝoj
- Aktivigaj grupoj

Jen estas kelkaj proponoj de la speciala komitato por pli bona Esperanto-agado en Svedio, kiu laboris sub la gvido de Lennart Åberg.

## Loterioj

Por doni al nia movado pli bonan ekonomion, la komitato montras al la ekzemploj, kiujn donis la kluboj en Göteborg kaj Skövde. Ili sukcesis ekhavi bonan ekonomion danke al grandaj tombola-loterioj. La polico en ĉiu komunumo povas doni informojn pri la eblecoj. Plej bonan efikon donis la loterioj en grandaj magazenoj.

## Studinformoj en la bibliotekoj

Antaŭ la printempaj kaj aŭtunaj kursoj de la kluboj, estas konsilinde meti informilojn en la komunumajn bibliotekojn. Estas permesate meti tie broŝurojn tiaspecajn. Facile oni povas fari falfolion 4-paĝan en grandeco A 5 kun bezonataj informoj. La komitato povas doni informojn pri la fabrikado de la folioj.

## Distanc-kursoj

La nova kurslibro de Ingemar Nordin povus esti bazo por nova tipo de kursoj, leterkurso en formo de distanc-lernado – svedlingve "Distansundervisning", mallongigite "DU-kurs".

Tiu tipo de lernado bone sukcesis ĉe niaj universitatoj lastatempe.

## Vojaĝoj

SEF devas elekti personon aŭ grupon, kiu laboros pri vojaĝaranĝoj por esperantistoj, ekz. al mondkongresoj, aliaj konferencoj, kursoj ktp.

La SEF-estraro devas ankaŭ havigi al la movado etajn aktivigajn grupojn multloke en la lando. Tiaj grupoj estu bona apogo por la estraro.

Pli detalajn informojn povas doni **Lennart Åberg**, Göteborg. Precipe la aranĝoj pri distanc-kursoj povas interesi ĉiujn klubojn.

# Esperantoböcker i bokhandeln

Margaretha Skarin läser franska på universitetet i Linköping. När hon köpte kurslitteratur på Esselte Bokhandel där, undrade hon varför man inte hade några böcker på Esperanto. Reaktionen blev oväntad. Man bad henne föreslå några lämpliga titlar, vilket hon också gjorde.

För någon tid sedan blev hon till sin stora förvåning kontaktad av bokhandeln, som ville ha förslag på fler böcker till sin lilla Esperantohörna.

Det här kanske är något att tänka på även i andra städer. Om du har dina vägar förbi, så köp gärna en Esperantobok i Linköping!

*Esperantoförlaget*

# Gungorna och karusellen

Att skicka små paket med tunga böcker världen runt är en dyr hantering. För att kunna fortsätta med bokförmedling väljer Esperantoförlaget att höja priserna på egna utgåvor.

En av de verksamheter som bedrivs på Esperanto-Centro är förlagets bokförmedling. Den har kravet på sig att gå ihop ekonomiskt, men med en kraftig belastning i form av t ex hyra, lyckas det dåligt att nå dit.

Den livliga förläggarverksamheten i Esperantujo bedrivs på många, många håll. Det gör att det både är tidsödande att finna böcker ibland och att portokostnaderna blir dryga. Med den lilla volym det handlar om får man höga omkostnader. Ekvationen går inte ihop.

Är det idé att fortsätta med bokförmedlingen? Nog undrar man ibland. Men tanken, att det inte skulle finnas någonstans dit nyblivna esperantister med spirande läshunger, bibliotek och moster Märtha på jakt efter födelsedagspresenten skulle kunna vända sig för att få hjälp, är inte så lockande. Och att helt sakna möjligheten att visa varierande smakprov vid t ex Bok & Biblioteksmässan, där vi deltagit två gånger, eller visa intresserade människor, journalister, lärare och andra prov på vad som bjuds, det lockar inte heller.

Så vi drar vidare, vilket innebär en prishöjning under hösten. Men vi väljer att höja priserna på egna utgåvor, eftersom de har lättare att tåla den påfrestningen. Gungorna och karusellen alltså.

De nya priserna gäller från 1 oktober och är:

| | |
|---|---|
| Esperanto! Nyckeln till det... | 12 kr |
| D:o 10 ex. | 83 kr |
| D:o 100 ex. | 330 kr |
| BOULTON, Ne nur leteroj de plumamikoj | 41 kr |
| FRÖSCHEL, Ho ve, miaj ŝuoj | 33 kr |
| MARTINSSON, Aniaro | 84 kr |
| Jen nia mondo 1 | 41 kr |
| Jen nia mondo 2 | 60 kr |

## Kotizoj por 1989

Baldaŭ estos tempo pensi pri la jarkotizoj por 1989. Laŭ decido dum la kongreso en Sundsvall, la kotizoj por la plej ordinara membrokategorio estis altigita per 25 kronoj.

La nova kotizo por individua membro, kiu pagas rekte al SEF sen kluba peranto, estos 125 kronoj. La kotizoj por familiaj kaj junularaj membroj restos je 50 kronoj. Pagu la kotizon al SEF, poŝtĝira konto 2012–3.

Pri la klubaj kotizoj la klubkasistoj ricevos informojn. Ni tamen jam nun povas atentigi, ke la kluboj pagos al SEF 100 kronojn por ordinaraj membroj, 40 kronojn por familiaj membroj kaj 35 kronojn por junularaj membroj.

*En Jyväskylä*

# Kongresa rezolucio de KELI

KELI – Kristana Esperantista Ligo Internacia –

- Kongresante en Jyväskylä, Finnlando) de la 11-a ĝis la 18-a de julio 1988,
- informiĝinte objektive pri konkretaj intencoj komplete pereigi milojn da loĝataj vilaĝoj en Rumanio kun kulturaj valoraĵoj plurjarcentaj,
- konsiderante, ke tio estus ne nur ofendo kontraŭ humaneco, sed ankaŭ kulpo kontraŭ la ordo de Dio (ekz. en La Agoj 17:25-28),
- urĝe apelacias al "la konscienco de la mondo", politikaj respondeculoj, ekleziaj gvidantoj, aktivuloj sur la tereno de homaj rajtoj, kulturaj movadoj kiel la Esperantomovado, UNESKO, ks, proteste interveni por haltigi tiujn planojn kaj savi la viveblecon de miloj da homoj, inter kiuj plej multaj estas minoritatanoj.

*Jyväskylä la 18-an de julio 1988.*

## Korespondi deziras

**Su Yan Ling** deziras korespondi pri dancado, kantado, literaturo kaj lingvoj kun personoj de ĉiuj aĝoj, precipe artistoj. Ŝia adreso estas: **Urbo Nanning, Provinco Guanxi, Yishu Xueyuan, Ĉinio.** (Rimarko de la peranto: Su Yan Ling estas juna aminda virino el la sudo de Ĉinio kaj lernanto de Esperanto.)

*Recenzo*

# Tri libroj por libroamantoj

## Bestoj kaj homoj

Kiamaniere disvastigi Esperanton, kiel plifortigi nian movadon? Fundamenta kondiĉo por sukceso estas, ke ni, kiuj volas esti esperantistoj, plibonigas nian lingvoscion!

Tie ni havas la problemon de la "eternaj komencantoj". Mi mem estas unu el tiuj, kiuj haltis duonvoje. Sed kial? Ĉar mi supozis, ke ne ekzistas libroj por legi, libroj meze malfacilaj kaj samtempe interesaj.

Nun mi scias pli prave! Tiaj libroj multas en Esperantujo. Kaj unu el la plej bonaj ekzemploj nomiĝas "Bestoj kaj homoj" de Bernard Golden. (Li antaŭe verkis la novelaron "Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ" - ankaŭ ĝi ege leginda!)

"Bestoj kaj homoj" estas novelaro. Ĝi konsistas el dek tri diversaj rakontoj, antaŭe aperintaj en diversaj Esperanto-periodaĵoj. Ĉiuj estas facile digesteblaj, pro almenaŭ du kialoj:

Unue, ili estas variaj kaj interesokaptaj. Kiam oni komencis legi rakonton, oni malfacile povas ĉesi, devas scii kiamaniere ĝi finiĝas. Due, ili havas sufiĉe, sed ne tro da novaj vortoj por meznivela esperantisto. Tial "Bestoj kaj homoj" verŝajne bone taŭgas por plibonigi vian lingvoscion.



Krome estas ĝojige konstati la fakton, ke troviĝas altnivelaj beletraj libroj, originale verkitaj en Esperanto. Kaj daŭre aperas novaj. Tio donas eblecojn. Necesas nur, ke ni, la esperantistaro, utiligas la eblecojn donitajn al ni.

Do, mendu tuj ĉe Esperanto-Centro ekzempleron de la nova Bernard Golden-libro! La prezon mi ne povas doni, sed kiom ajn ĝi kostas, indas pagi la duoblon.

**Jan Milld**


## Giorgio Silfer finfine en libra formo

Giorgio Silfer apartenas al la plej ĝuindaj nuntempaj verkistoj en Esperantujo. Nun haveblas kolekto de lia beletra produktado inter 1978 kaj 1985. Kooperativo de Literatura Foiro nome eldonis la libron "Desislava ridetas", kiu enhavas kaj poezion kaj prozon de Giorgio Silfer.

Estas rimarkinda diferenco inter lia poezio kaj lia prozo. La poezio estas melankolia sed la prozo des pli humura. La poemon, kiu donis la titolon al la libro, li verkis post kiam li en Sofio vidis antikvan freskon de princino Desislava, konata kiel "la Gioconda de la Oriento".

Espereble la libro havos tiom da merita sukceso, ke oni estontece povos ĝui ankaŭ aliajn verkaĵojn de Silfer, ankoraŭ ne aperintajn libroforme sed "nur" en Literatura Foiro, Monato kaj Kontakto, kie li havas forumon tre karan por la legantoj de tiuj gazetoj.

**B.A.**



## Somera tago kaj aŭtuna vespero

*de Inger Brattström (traduko de Malte Markheden), eldonita de Progreso Eldonejo, Motala. Prezo 40 kronoj + sendokostoj.*

Inger Brattström estas bone konata kaj ŝatata verkisto de junularaj libroj. Tiu ĉi libreto temas pri amindaj dekkelkjaruloj, kiuj nur en la someroj renkontiĝas en vilaĝo ĉe la maro. Nun en la lasta tago ili jam enuas kaj sopiras al la urbo, kiam subite okazas io terura. Mara akcidento faras ilin pli proksimaj unu al la alia. Ili neniam kutimis renkontiĝi krom en la someroj, sed en iu aŭtuna vespero ili decidas tion fari. Tiun vesperon ili ĉiu aparte travivas multajn aventurojn, ĝis ili fine renkontiĝas.

En tiu ĉi eta libro ĉiam okazas io streĉa, ĝi estas plena de aventuroj. Multaj el ili estas sufiĉe oftaj en la vivo, tamen tre interesaj ĉefe por dekkelkjaruloj. Kaj, grave, ili estas instruaj. La ĉefroluloj estas simpatiaj. Per tre bona psikologio estas priskribitaj iliaj sentoj kaj reagoj al la okazintaĵoj.

Legante la libron mi sentis kvazaŭ mi mem estus partoprenanto. Estas ĝojo legi ĉi tiun turnoriĉan rakonton.

**Beatrix Svenonius**

# Åttaveckorskurs i esperanto nu också i Nordmöre


Nu finns det nöjlighet att läsa esperanto på folkhögskola på 8-veckorskurser även i Norge. Det är Nordmöre Folkehögskule i Surnadal, som startar kurser i höst. Surnadal ligger mitt emellan Trondheim, Kristiansund och Molde med goda bussförbindelser i alla riktningar.

Eftersom skolan tar emot även utländska studenter, kan det vara ett bra tillfälle att lära sig esperanto och samtidigt lära känna sitt grannland Norge.

Kursansvarig är Kirsti Fossgård och gästlärare första terminen är Torstein Kvakland från Trondheims Esperantoforbund. Båda har varit med på kurserna på Nordiska Folkhögskolan i Kungälv både förra året och i år.

Intresserade kan skriva till Nordmöre Folkehögskule, N-6650 Surnadal och be om kurs- och prisuppgifter. Telefon till skolan 073 61922.

M. A.



# UEA bonvenigas novan Ĝeneralan Direktoron en Unesko

La Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ro Federico Mayor, en letero de la 24-a de aprilo, respondis al la bonveniga mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de lia elektiĝo kiel la nova gvidanto de Unesko. "Viaj esprimoj de subteno kaj via apogo de la universala celaro de Unesko estas tre kuraĝiga", skribis s-ro Mayor, "kaj mi antaŭĝuas la evoluigon de kunlaboro kun via asocio."

Li aldonis: "Per vastigo de kunlaboro kun neregistaraj organizaĵoj kun la internacia rekono kaj sperto de via asocio, ni povos fortigi niajn klopodojn je la servo de la internacia komunumo."


# Esperantolotteriet

Lottpris 20,– kr; 635 vinster
Försäljningstid t o m 28 februari
Beställ lotter på telefon 0590 – 302 08 (telefonsvarare), eller med postkort, adress "Espero 88", Box 80, 682 01 Filipstad.

Postförskott, 10 eller fler lotter kommer portofritt.

Högsta vinsten är premieobligationer med inköpsvärde 5 000 kr.

**Beställ lotter nu!**

*Kungälv*

# 4:a internacia kurso esperanta

"Mi tre ĝojis esti ĉi tie en tiu ĉi bela lernejo. Ĉio estis bona." "Estis la plej bonaj premisoj por aranĝi similan kurson, kiujn mi eble iam spertis." "Tre impresis min la amika kaj gaja atmosfero."

Jen eldiroj de tri el la eksterlandaj instruistoj de la internacia kurso en Esperanto, kiu okazis aŭguste ĉe la Nordia Popolaltlernejo en Kungälv. Estis la kvara fojo, ke oni aranĝis tian kurson en kunlaboro kun la lernejo kaj la regionaj esperantistoj.

## Partoprenantoj el 9 landoj

La kurson partoprenis 64 personoj el 9 landoj. La plej multaj venis el diversaj lokoj en Svedio, sed sufiĉe multaj venis ankaŭ el Norvegio. Krome venis kelkaj el Danlando, Bulgario kaj Litovio.

Estis kvin diversaj grupoj, de komencantoj ĝis kursgvidantoj, kaj krome grupo por malgrandaj infanoj, 6 - 9 jarojn aĝaj.

Instruistoj estis Andrzej Pettyn, Audrey Childs-Mee, Joachim Werdin, Libertaria Mladenova, Bernard Nzaniye kaj, por la infanoj, Inga Johansson.

## Lekcionoj kaj prelegoj


Antaŭtagmeze estis lekcionoj kaj posttagmeze/vespere estis prelegoj kun diskutoj. Prelegantoj estis:

Hans Hendriksen, instruisto en la Nordia, kiu ankaŭ sekvis la kurson kaj bonege helpis nin diversmaniere. Li estis tre populara inter la kursanoj . Li rakontis pri la lernejo, pri la labormetodoj kaj pri la lingvoproblemoj, kiujn ili havas, ĉar venas instruistoj kaj gelernantoj el la tuta Nordio. Ni ankaŭ aŭdis iom pri la historio de la urbo Kungälv mem.

Andrzej Pettyn el Varsovio, bonkonata al la plej multaj esperantistoj pro siaj programoj en la pola radio, informis nin pri la elsendoj en Esperanto, kiuj komenciĝis antaŭ tridek jaroj kaj evoluiĝis iom post iom ĝis nunaj ses elsendoj tage. Ni ankaŭ informiĝis pri la nuna stato de la Internacia Esperanto-Centro en Bjalistoko.

Joachim Werdin rakontis pri planata unujara esplorvojaĝo tra Azio por ekscii pri la evoluado de la Esperantomovado tie, kaj ankaŭ pri la bezono de helpo pri lerniloj kaj starigo de kursoj diversloke. Li prelegis ankaŭ pri la psikotronika metodo sanigi sin mem– oni sanigas sin per la forto de la menso.

Mariana Elenova rakontis pri kvar bulgaraj verkistoj, kies libroj antaŭ nelonge aperis en esperanta traduko, kaj legis elektitajn partojn el tiuj verkoj.



## Debata vespero

En unu vespero oni aranĝis debaton kun la temo "La lingvo kaj la identeco". Ĉefa enkondukanto estis Kaarlo Voionmaa, lingvisto el la universitato de Gotenburgo, sed ankaŭ aliaj personoj faris mallongajn enkondukojn, i.a. Hans Hendriksen kaj kaj Andrzej Pettyn donis siajn ideojn pri tio, kiel la lingvo, kaj tiam ankaŭ Esperanto, influas al ni. Poste sekvis sufiĉe vigla debato kaj la tuto estis enkadrita per kantado en diversaj lingvoj: Bulgara, finna, svahila kaj sveda. Ni ankaŭ vidis demonstron pri la funkcio de la gesta lingvo, dum ni aŭskultis la svedan kanton.

## Cetere

Cetere la programo enhavis "poentan promenon" en la belaj ĉirkaŭaĵoj, ekskurson aŭtobusan al Gotenburgo kun vizito en la amuzejo Liseberg kaj adiaŭan vesperon danco, kantado, ludoj, ktp. Kaj la tutan tempon, preskaŭ, la suno brilis. Populara loko renkontiĝi estis ĉe la librotablo, kie multaj homoj kaptis la okazon aĉeti librojn, por hejme daŭrigi la studadon de la lingvo, ĝis oni renkontiĝos denove en la Nordia dum la venonta kurso. Ĉar devos esti nova kurso, tion ĉiuj partoprenantoj esperis.

Ni kurskomitatanoj tre ĝojis pro la granda intereso por la kurso, kaj ni ankaŭ volas danki al ĉiuj, kaj geinstruistoj kaj gekursanoj, por la gaja, agrabla etoso, kiu regis dum la tuta tempo. Tio kuraĝigis nin, iom lacaj je la fino de la kurso, promesi daŭrigon. Sed antaŭ ol plani tion, ni devos fini la administran kurslaboron kaj ripozi!

**La Aranĝintoj**

## Regionsträff i Hallsberg

TEDU-regionens upptaktsmöte inför höstterminen har avhållits i järnvägsknuten Hallsberg.

Förutom ett fåtal deltagare från regionens 10 klubbar, var direktanslutna medlemmar och elever i brevkursen närvarande från Arboga, Norberg, Krylbo och Tibro. Som ledare i nybörjarkursen respektive kommunikationskursen fungerade Anna Sandgren och Bertil Bengtsson från Hallsberg samt Inga Johansson Från Göteborg.


Som första programpunkt informerades om den av UEA utarbetade metodiken för undervisning i språkkunskap, "Lerneja projekto". Skolöverstyrelsens handlingsprogram för skolans internationalisering omnämndes och deltagarna fick särtryck av artikeln "Esperanto som medel till avspänning" av Bengt Thelin, Skolöverstyrelsen. Den enligt många viktigaste händelsen under senaste tid inom svenska esperantoverksamheten är tillkomsten av fasta kurser i esperanto vid Karlskoga Folkhögskola. Prospekt från folkhögskolan utdelades.

Kommunikationskursen omfattade såväl komversation som korrespondens. Man skrev bl a hälsningar till utländska esperantister med hjälp av Postens "Skriv brev på esperanto". För att stimulera deltagarna till livligare kontakter per brev och ljudbrev uppmanades deltagarna att starta brevskrivarcirklar i hemortens studieförbund och samtliga fick en utarbetad studieplan i ämnet. Intresserade fick även ett ljudbrev (kovolut + kassett för intalning).

Som avslutning på träffen diskuterades arbetet inom klubbar och region. Från Stadsbiblioteket i Göteborg presenterades foldern "Böcker på esperanto", som visade att Göteborgsbiblioteket har 169 titlar skönlitteratur och 126 titlar facklitteratur; alltså 295 olika böcker på esperanto för utlåning. Dessa böcker kan beställas till låns i hemortens bibliotek. Alternativt kan man uppmana kommunens bibliotek att inköpa önskade böcker. Begär en förteckning över ortsbibliotekets esperantoböcker och visa densamma på ett klubbmöte.

## Årets esperantodag

firades den 3 september av Motala Esperantoklubb tillsammans med Studiefrämjandet genom en satsning på utåtriktad verksamhet. Allmänheten inbjöds till en utfärd i svamprika marker. Trots regnigt väder deltog flera personer än de som anmält sig och resultatet blev över förväntan. 44 olika arter ätbara svampar och över 20 oätligbara sorter visades upp för den expert, som granskade skörden och gav goda råd i samband med kaffesamkväm på Verner von Heidenstams Övralid. Information om esperanto ingick även i dagens program.



*KARLSKOGA FOLKHÖGSKOLA*

***inbjuder till nya 8-veckorskurser i***

# ESPERANTO

***Nybörjarkurs startar 9 januari***
***Fortsättningskurs startar 13 mars***

***Begär upplysningar:***
***Karlskoga Folkhögskola***
***Box 192***
***691 24 KARLSKOGA***
***0586 - 503 60***
***Kursledare: Lars Forsman***

*Jarfinaj vortoj*

# Kelkaj ridindaj kelkaj pripensindaj

Knabeto faletis sur la strato kaj blasfemis malbele. Maljuna virino aŭdis tion kaj esprimis indignite:

–Ne blasfemu tiel, ĉar vi tiam neniam venos al la ĉielo!

–Mi ne celas tien, mi survojas al la vendejo por aĉeti terpomojn.

◆

La pastro parolis al la aŭskultantaro:

–Mi povas kun ĝojo raporti, ke la preĝejo ricevis tre valoran donacon, sed la donacinto deziras esti anonima.

Tiam sinjoro Andersson stariĝis el la benko kaj diris:

–Jes, mi pripensis la aferon kaj decidis, ke tio estus plej konvena.

◆

Mi nun legas la libron "Vortoj de Andreo Cseh" kaj estas trafita de la vortoj sur paĝo 38, kiuj estas gravaj por ĉiuj esperantistoj:

"Tiuj amikoj de la mondlingvo, kiu deziras vidi la venkon de Esperanto, estu konsciaj pri tio, ke ĉiu paŝo kaj paŝeto, kiun ili faras en Esperanto, estas parto de la venko. Ĉiu libro kaj gazetnumero, eldonata en nia lingvo, ĉiu kursleciono, ĉiu letero kaj poŝtkarto skribita en Esperanto, eĉ ĉiu elparolata vorto estas briko en la malrapide, sed certe konstruiĝanta triumfa arko de Esperanto."

**Ivar Nilsson**

# Prelegvojaĝo de Andrzej Pettyn

Post la kurso en la Nordia Popola Altlernejo en Kungälv, Andrzej Pettyn restis ankoraŭ iom da tempo en Svedio. Dum tiu tempo li faris etan rondveturon kaj rakontis pri la elsendoj en la pola radio kaj pri la preparoj de la Internacia Esperanto-Centro en Bjalistoko. Li ankaŭ faris diversajn intervjuojn kaj vizitis proksimradiajn staciojn. Ĉar li partoprenis la Kulturan Esperanto-Festivalon en Lund, li ankaŭ tie havis eblecon fari multajn programerojn, kiujn la aŭskultantoj de la pola radio povos aŭskulti dum la aŭtuno.

La urboj, kiujn li vizitis, estis Kungälv, Göteborg, Karlskoga, Skövde, Lund kaj Malmö. Laŭ informoj kaj Andrzej Pettyn kaj la klubaj reprezentantoj estis tre kontentaj pri liaj vizitoj, malgraŭ tio, ke ne estis favora tempo organizi klubaktivecojn.

**Märtha**


# BRIGHTON

Nu går det bra att anmäla sig till UEA-kongressen i Brighton 29 juli-5 augusti 1989. Om du anmäler dig före den 31 december får du den lägsta kongressavgiften.

## Kongressavgifter (i SEK)

| | Till 31/12 88 | Till 14/5 88 | Från 15/5 89 |
|---|---|---|---|
| 1. Direkt medlem i UEA | 460 | 575 | 680 |
| 2. Icke direkt medlem i UEA | 575 | 680 | 800 |
| 3. Kunulo/junulo/handikapulo som själv är direkt medlem i UEA | 230 | 345 | 360 |
| 4. Kunulo/junulo/handikapulo som inte själv är medlem i UEA | 345 | 360 | 575 |

Beställ anmälningsblankett hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-50152. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till pg 14 74 29 - 5 Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

# Önske-lista från Tanzania

*Nu i önskelistetider - lägg den här på minnet. Den är aktuell länge:*

*# Tvillingklubbar*
*# Brevvänner*
*# Läromedel*
*# Tidningar*
*# Pengar till ett tanzaniskt informations-blad, både till esperantister och andra.*

*Skriv till mig för att få adresser och tips, eller skicka en slant, till mitt eget postgiro (tills vidare), eller till UEA:s Fondaĵo Afriko. Rapporter om utvecklingen kommer i La Espero i mån av utrymme.*

***Anita Lindblom***
***Mariehamnsgatan 18***
***164 79 KISTA***

***postgiro 449 48 91 - 7***

# Dags att prenumerera!

*Prenumerera på en eller flera esperantotidningar, så får du veta, vad som händer i esperantovärlden, och du träna språket samtidigt. Priser gäller för 1989.*

*Du beställer tidningar genom att sätta in pengar på pg 14 74 29 - 5, Svenska Esperantoförbundet, specialkonto, Hörby.*

*Förfrågningar angående tidningsprenumerationer kan göras hos: **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-50152.***

| | |
|---|---|
| El Popola Ĉinio | 90 kr |
| El Popola Ĉinio, 2 år | 150 kr |
| El Popola Ĉinio, 3 år | 210 kr |
| Fokuso | 80 kr |
| Fonto | 140 kr |
| Heroldo de Esperanto | 125 kr |
| Hungara Vivo | 65 kr |
| ICEM Esperanto | 60 kr |
| Juna Amiko | 30 kr |
| Kancerkliniko | 95 kr |
| Kontakto | 75 kr |
| Kulturaj Kajeroj | 75 kr |
| La Jaro | 25 kr |
| Literatura Foiro | 150 kr |
| Monato | 190 kr |
| Norvega Esperantisto | 50 kr |
| Oomoto | 60 kr |
| Paco | 66 kr |
| Scienca Revuo | 80 kr |
| UN kaj NI | 50 kr |



## Årets julklapp för gammal och ung

### Kumeuaua, djungelns son

Läs "Kumeuaua, djungelns son", skriven på Esperanto av Tibor Sekelj, i svensk översättning! 68 sidor. Två sidor information om Esperanto. Många bilder.
1 ex: 45 kr. 3 ex eller fler: 38 kr/st. Beställ genom att betala på postgiro 57 20 82 - 6 (Nordenstorms förlag, Studentvägen 36 L 51, 752 34 Uppsala).

STEN SVENONIUS
ERIKSTORPSGATAN 26 A

217 54 MALMÖ

# MEDLEMSAVGIFT I UEA FÖR 1989

Redan nu kan ni betala medlemsavgiften till UEA för 1989.
Avgiften är för:

| | |
|---|---|
| MJ, medlem med årsbok, | 100 kr |
| MA, medlem med årsbok och tidningen Esperanto, | 250 kr |
| Societo Zamenhof, som är en stödjande kategori och inte inkluderar medlemskap i UEA, | 500 kr |

Den person, som den 1 januari ännu inte fyllt 26 år, får dessutom ungdomsförbundets tidning kontakto.

Avgiften kan betalas in på pg 14 79 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

Förfrågningar kan göras hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-40152.

# Anoncoj en La Espero

Estas eble anonci en La Espero laŭ jena tarifo:

| | |
|---|---|
| 1/1 paĝo | 2.400 kr |
| 1/2 paĝo | 1.450 kr |
| 1/4 paĝo | 850 kr |
| 2 kolumnoj X 6 cm | 500 kr |

Por Esperantosocietoj kaj ties membroj 50-procenta rabato de ĉiuj prezoj. En specialaj kazoj, kontaktu la redakcion.



# La Espero en 1989

La eldondatoj por La Espero dum 1989 estos (proksimume):

| | *Aperdato* | *Limdato por materialo* |
|---|---|---|
| n-ro 1 | 15-a de februaro | 16-a de januaro |
| n-ro 2 | 31-a de marto | 15-a de februaro |
| n-ro 3 | 15-a de junio | 12- de majo |
| n-ro 4 | 15-a de septembro | 15-a de aŭgusto |
| n-ro 5 | 16-a de oktobro | 1-a de septembro |
| n-ro 6 | 30-a de novembro | 16-a de oktobro |

La materialo devas esti korekte tajpita kun duobla lini-interspaco. Multaj libervole partoprenas en la pretigo de nia membrogazeto. Se okazas, ke unu en la ĉeno havas malhelpaĵon, la gazeto malfruiĝos. Tial sendu manuskriptojn pri okazintaĵoj kiel eble plej frue.